

Globish

aŭ kiamaniere disvastiĝis la angla

Miroslav Malovec

Globish estas slanga esprimo por simpligita angla lingvo, kiu disvastiĝis tra la mondo kiel relative facila internacia komunikilo. Fakte temas pri baza vortprovizo, kiun oni trovas en ĉiu fremdlingva lernolibro por komencantoj, tamen aliaj lingvoj ne estas tiom sukcesaj, kvankam ankaŭ iliaj lernolibroj prezentas same simpligitan lingvaĵon. Kiel esperantiston min interesas, kiamaniere kaj pro kiaj kialoj tio okazis. Mi aĉetis libron de Robert McCrum, kiu klopodas tiun fenomenon ekspliki.

Laŭ historiaj fontoj antaŭ du mil jaroj la britan insulon konkeris romianoj, kiam tie vivis keltoj, kaj restis tie ĝis la jaro 410. Poste la insulon invadis anglosaksoj kaj regis ĝis la jaro 1066, kiam la insulon konkeris normandoj sub komando de Vilhelmo la Konkeranto. Normandoj estis posteuloj de skandinavaj vikingoj, kiuj antaŭ du jarcentoj konkeris la nordon de Francio kaj franciĝis, parolante vikingan dialekton de la franca. La anglosaksa lingvo konservis sian ĉefan pozicion, sed estis modifita de la kelta, latina, franca kaj skandivaj lingvoj kaj el tia miksaĵo evoluis la moderna angla. Tiu lingvo konas nur minimuman deklinacion kaj konjugacion, kio faciligas lernadon, sed havas malfacilan prononcon kaj historian ortografion, kiuj la lernadon malfaciligas. Eĉ denaskuloj ne scias prononci nekonatan vorton, kiun ili vidas skribita, nek korekte skribi nekonatan vorton, kiun ili aŭdas.

Sed tio estas rezulto de multjarcenta evoluo. La anglosaksa lingvo uzis simplajn vortojn de kamaparanoj, al kiuj la korteganoj aldonadis multajn sinonimojn de franca deveno. La literaturan lingvon evoluigis poeto Geoffrey Chaucer en siaj erotikaj *Rakontoj de Canterbury*, poste Thomas Malory en ciklo de legendoj pri la reĝo Arturo en romano *La morto de Arturo*, kaj precipe William Shakespeare, kiu uzis ekstreme riĉan vortprovizon en siaj teatraĵoj. La lingvon riĉigis ankaŭ Thomas More, John Milton, Daniel Defoe kaj Jonathan Swift. Gravaj estis traduko de *Biblio de la reĝo Jakobo*, kaj traduko de Homero, el plumo de Alexandre Pope.

Ekstreme gravaj por evoluo kaj disvastigo de la angla lingvo estis fondo de kolonioj en Ameriko kaj Aŭstralio. La lingvo ne nur riĉiĝis, sed fariĝis gepatra lingvo de pluraj nacioj. Cetere, multaj gravaj anglalingvaj aŭtoroj estas irlandanoj (Swift, Wilde, Shaw, Joyce) aŭ skotoj (Scott, Stevenson) apud aŭtoroj anglaj (Thackeray, Dickens). Originala literaturo evoluis ankaŭ en Usono (Cooper, Hawthorne, Poe, Melville, Twain). Precipe *Huckleberry Finn* de Mark Twain enkondukis en literaturon tute novan manieron de rakontado kun multaj popolaj esprimoj de la usona varianto de la angla. Kaj ankaŭ de la nigrula slango, kiu grave influis la usonan anglan. Ĉar usonanoj venigis en Usonon milionojn da nigraj sklavoj, kiujn ili ĉasis en Afriko kvazaŭ brutojn kaj simile ili kondukis al ili.

En la jaro 1842 estis Charles Dickens, tiam tridekjara, sed jam glora aŭtoro de sinjoro Pickwick, Oliver Twist kaj aliaj verkoj, invitita al Usono, por vidi, kiel aspektas demokratio. Li venis seniluziigita. An sia libro *Amerikaj notoj* li skribas, ke en la usonaj urboj vagas surstrate porkoj, kiuj al neniu apartenas, la homoj senĉese maĉas tabakon kaj kraĉas ĝin sur la teron, ke eĉ en la parlamento li timis surpaŝi tapiŝon, ĉar tiom malpura ĝi estis, la rivero Misisipo estas laŭ li malpura bruna kaĉo, plena de lignoj kaj forĵetaĵoj. Sed plej multe lin kolerigis sklavismo. Li miris, ke homoj, kiuj laŭte krias Frateco, Libereco, Egaleco, povas alian homan estaĵon trakti pli brutale ol bruton. Li citas el unu gazeto anoncojn pri serĉado de fuĝintaj nigruloj: *Fuĝinta nigrulo, mankas al li fingroj de la maldekstra piedo. Fuĝinta negrino Mary, mankas al ŝi elbatitaj dentoj* k.s. Romano *Kabano de onklo Tom* de verkistino Harriet Beecher Stowe instigis militon de Nordo kontraŭ Sudo, kies rezulto post dek jaroj estis nuligo de sklavismo. Tamen estis bezonataj ankoraŭ cent jaroj, kiam post morto de Martin Luther King, fariĝis nigruloj egalrajtaj kun blankuloj.

Tamen ankaŭ Anglio mem en la 19-a kaj 20-a jarcentoj okupaciis plurajn landojn en Afriko kaj Azio. Tiam oni diradis, ke super Britio la suno neniam subiras, ĉar brita regado troviĝas en ĉiuj kontinentoj. Parte la regado estis pozitiva, ekzemple la hinddevena angla verkisto Kipling, aŭtoro de Maŭgli, laŭdis la anglan regadon, ke ĝi alportis al subevoluintaj popoloj civilizacion, sed aliflanke kiel ĉiu okupacio ĝi estis negativa pro perforto kaj humiligado de indiĝenoj. Nur post la dua mondmilito sukcesis Gandhi per sia metodo de senperforto anglojn elpeli el Hindio, tamen la angla lingvo restis ĉiam grava en tiu lando, kie vivas multaj popoloj kun multaj lingvoj kaj la angla fariĝis ilia komuna komunikilo.

Ankoraŭ pli kruele kondukis ne nur angloj, sed ankaŭ aliaj eŭropanoj en Afriko. Ekzemple en la tempo, kiam nia nacio konstruis Nacian Teatron en Prago, la belga reĝo Leopoldo la II-a en Belga Kongo, kiun li konsideris sia privata havaĵo eĉ kun dudek milionoj da nigruloj, elrabis la landon uzante nigrulojn kiel sklavojn. Kiuj rifuzis labori, tiujn li buĉis aŭ forhakis manojn al liaj infanoj. Neniu scias precize la nombron de liaj viktimoj, sed ŝajnas, ke ĝi estis komparebla kun holokaŭsto kvindek jarojn poste. Ankaŭ francoj, portugaloj, nederlandanoj havis siajn afrikajn koloniojn. Kaj kiam la kolonioj liberiĝis, ĉu en Afriko, ĉu en Azio, la lingvoj de la koloniistoj restis kiel komuna interkomprenigilo de popoloj, sed forte influitaj de lokaj lingvoj. Ekestis tiel nomataj piĝinoj, lokaj komunikiloj por komercado, konsistataj el miksaĵo de vortoj el diversaj lingvoj kun adaptita prononco. Kelkaj el tiuj piĝinoj eĉ fariĝis lingvoj gepatraj kaj tiukaze la lingvistoj parolas pri kreoliĝintaj lingvoj.

Antaŭ la dua mondmilito estis la ĉefa mondlingvo la franca. Sed kiam Francio estis venkita de nazioj, la lingvo perdis sian signifon kaj anstataŭigis ĝin la germana ĝis la fino de la milito. Sed kiam ankaŭ Germanio malvenkis, la germana eĉ estis eliminata el la oficialaj lingvoj de Unuiĝintaj Nacioj. La ĉefa mondlingvo fariĝis la angla, en la socialisma bloko la rusa. Sed la homoj en la socialisma bloko la rusan malamis kiel lingvon de okupaciantoj kaj totalismaj diktatoroj. Kiam niaj infanoj lernis devige la rusan, en la okcidenta Eŭropo estis instruata la angla kaj same ankaŭ en Rusio mem. Ankaŭ en la socialisma bloko la homoj lernis la anglan propravole, eĉ volonte pagis al lingvolernejoj, ĉar la angla estis ĉiam tre populara.

Kiam oni komencis paroli pri tutmondiĝo aŭ globalizo, la angla komencis esti komprenata kiel lingvo de la tutmonda interkompreniĝo, ĝia simpligita formo estis nomata globish. La gejunuloj ĝin lernas kun entuziasmo, en retaj diskutejoj ili skajpas anglalingve kun eksterlandaj geknaboj kaj tiel ili pliperfektigaĵas. Ĉar oni scias, ke ne temas pri literatura angla de Shakespere aŭ Hemingway, sed pri simpligita formo, kiu havas eĉ siajn naciajn variantojn, ĉiuj estas tre toleremaj rilate la erarojn de aliaj. Mi mem spertis, ke denaskaj parolantoj de la angla laŭdis mian anglan, kvankam mi scias, ke mi parolas terure. La junuloj uzas anglajn vortojn eĉ en sia gepatra lingvo (jackpot, bungee jumping, dealer, summit ktp.).

Ĉio ĉi tre helpas al disvastigo de globish. La aŭtoro de la libro pri globish skribas pri ĉinaj gejunuloj, kiuj renkontiĝas en parko por komune interparoli angle. Globish funkcias inter sportistoj, dancistoj, filmistoj kaj aliaj. Ŝajne la problemo de internacia komunikado estas solvita.

Tamen, eĉ post 60 jaroj de intensa instruado de la angla, malgraŭ lavango da lerniloj kaj miraklaj metodoj kiel lerni la anglan, malgraŭ tio, ke preskaŭ ne ekzistas eŭropano, kiu almenaŭ ne provis lerni tiun lingvon, ĉar la registaroj elspezas ĉiujare miliardojn por tiu celo, la plejparto de la publiko la anglan ne scias uzi. Tial oni eĉ enkondukas duan fremdan lingvon en la lernejojn, ĉar la angla ne sufiĉas.

Mi ne estas certa, ĉu ĉiuj infanoj kapablas lerni Esperanton, se oni instruas ĝin same intense kiel la anglan. Estis farataj eksperimentoj, kiuj ne pruvis tion. Mi eĉ spertis en Lanĉov, ke hungaraj infanoj, kiuj devige lernis ambaŭ lingvojn, la anglan amis kaj Esperanton malamis, ĉar ili ĝin perceptis kiel truditan kontraŭ ilia volo. Kaj en raporto pri la eksperimento oni skribis, ke la instruistoj de Esperanto ĉion fuŝis, ĉar dezirante, ke la infanoj havu pli bonajn poentojn ol en la angla, ili disdonis la poentojn senlabore. La infanoj sentis, ke ili ne bezonas lerni kaj ricevos bonan poenton, tial ili nenion sciis malgraŭ bonaj poentoj.

Triono da homoj scias ellerni la anglan, espereble alia triono kapablas ellerni Esperanton, tial mi kredas, ke nia laboro havas sencon malgraŭ ŝajna venko de globish. Multaj homoj ne scias

pri ekzisto de Esperanto, aliaj scias, sed konsideras ĝin senutila, ĉar esperantlingve ili ne povas interkompreniĝi en hoteloj, restoracioj, aerodromoj, vendejoj. Sed se ili trovos multajn esperantlingvajn informojn en interreto, eble ili ŝanĝos opinion. Ni devas tion provi.